

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 525-6

JULIO-AUGUSTO 1949

Preta ĉirkaŭ la 15a de Julio

## SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

### ENHAVO

Enkonduko	- - - - -	<i>Rektoro Karl Söderberg, Svedujo</i>
La laponoj kiel kultura popolo	- - - - -	<i>Profesoro B. Collinder</i>
La kimraj artofestoj	- - - - -	<i>R Rossetti</i>
El la mirinda naturo	- - - - -	<i>C. Støp-Bowitz</i>
Astronomiaj sensacioj	- - - - -	<i>Profesoro K. Lundmark</i>
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	- -	<i>Profesoro D-ro Ivo Lapenna</i>
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	-	<i>D-ro P. Neergaard</i>
La kalevala kulturo	- - - - -	<i>Vilho Setälä</i>
Pri la sveda koopera movado	- - - - -	<i>Rektoro S. A. Stahre</i>
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	- - - - -	<i>F. Szilagyi</i>

**La libro enhavas la tekston de la prelegoj en Malmö**

Prezo 4 ŝil.    Afranko 2p.

(17 respondkuponoj)

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.*

**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**

**Ĉu ni daŭre perdadu la fruktojn de nia laboro ?** Tezo diskutenda de ĉiu E-grupo. Mendu, sendante 2 internaciajn respondkuponojn, ĉe Esperantista Klubo, Teplice, Ĉeĥoslovakujo.

**Libro por korespondemuloj senpage !** Legu Jarlibron 1949, p. 43.

**Religio laŭ racio kaj konscienco.** Ĉu estas eble ? Aŭ ĉu vi devas endormigi vian racion kaj konsciencon kiam vi eniras preĝejon ? Skribu al la Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj, S-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, London, S.E.22, Anglujo.

**Doganisto volas korespondi** kun akcizistoj kaj doganistoj ĉie. R. Abram, BM/CXXH, London, W.C.1, Anglujo.

**Kathleen Ford, 9-jara,** deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun geinfanoj. 38 Ash-hill Road. Torquay, Anglujo.

**Se iu kongresano** vizitos la Insulon Wight, personajn salutojn invitas J. A. Farmer, apotekisto, 79 High Street, Ryde, I.W.

**Nudul(in)oj, duonnudul(in)oj sur poŝtmarkoj !** Legu Jarlibron 1949, p. 13.

**Ne-katolikoj,** kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Deziras korespondi** kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj Karlo Fazekas, Kossuth-ter 22, Gyula, Hungarujo.

**Interŝanĝas poŝtmarkojn** k.ĉ.l. laŭ kvanto Ernesto Guillem, Pintor Sorolla 11, Valencia, Hispanujo.

**Magia Internacia Rondo !** Ĉiu esp.-magiisto rajtas membriĝi senkoste sed devas pruvi sian kapablecon rilate prezentadon de artifikaj magiaĵoj. Propra organo MIRO senpage dum 1949. Prezentu vin al S. W. Ahlm, Pontonjergatan 33, Stockholm, Svedujo.

**F-ino Magda Šupichová,** oficistino, Sokolská 339, Červený Kostelec, Ĉeĥoslovakujo, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la tuta mondo.

**Mi gastoakceptus** literatureman samideanon dum 3-4 semajnoj en Budapest. Mi donus senpagan loĝadon kaj nutradon se rekompence ankaŭ li gastigus min en sia hejmo je la somerfino. Respondoj estas petataj al la adreso de Literatura Mondo, Budapest VIII, Rökk Szilárd-str. 28, Hungarujo.

**Deziras korespondi** pri la nuntempa poezio kaj pri la problemoj de la arttraduko esperanta Jozefo Klein, Budapest VII, Holló-str. 5. I, Hungarujo.

**Atentu ! - - Gejunuloj tutmondaj ! - - Atentu !** De 14 ĝis 28-a de aŭgusto okazos en Budapest la grandioza "Festivalo" de la junularo tutmonda. Tie nepre devas esti reprezentata ankaŭ la esperantista junularo. Partoprenu ĉi tiun belegan junularan renkonton. La esperantista junularo de Budapest decidis kovri la restadkaj nutradkostojn de unu junulo kaj unu junulino eksterlandaj se li (ŝi) anoncos sin al la Festivalo kiel Esperantiston kaj faros tie esperantlingvan paroladon. Sin anoncu tuj al la adreso de : Georgo Bálint, Budapest 112, Poŝtfako 37. Nepre notu klare kaj legeble : vian nomon, aĝon, adreson, profesion (lernejon) kaj tion, kiam vi komencis lerni Esperanton, depost kiam vi parolas esperante, ĉu vi faris jam esperantan paroladon, ĉu vi skribis jam artikolon aŭ instruis la lingvon. Skribu tuj !

**S-ro Danilo Duranti,** Via Nizza 155, Torino, Italujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn k. ĉ. l., kvanto kaj valoro reciprokaj.

**Turisma servo en Belgujo.** Por gvidado kaj malmultekosta restado kontaktu S-ron Loeckx, Konijnenperken weg, Brussel (Bosvoorde). Tel : 48.44.36.

**Interŝanĝas poŝtkartojn** kaj deziras korespondi kun la tuta mondo, nepre respondos, S-ino Zilda Pereira, Banco do Brasil, Belo Horizonte (M.G.), Brazilo.

**Senŝi Osuga,** Tomari-maĉi, Tojama-ken, Japanujo, 28-jara, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

**Mi volas interŝanĝi leterojn** kaj poŝtkartojn tutmonde, korespondi kun angla spiritisto, astrologo : Vladimír Sladeček, Havličkova 19, Karvina I, Ĉeĥoslovakujo.

**12-jara knabino** deziras interŝanĝi kolorajn bildkartojn kun gesamideanoj de la tutmondo. Alicja Hortynska, ul. Zjednoczenia 74, Biala Krakowska, Pollando.

**Jean Bréard,** rue des Blevets, Auxerre (Yonne), Francujo, komencanto 25-jara, deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj.

Se vi deziras ekkoni la naturon de ISLANDO, la islandan popolon, kaj ĝian literaturon, abonu la novan, bele ilustritan Esperanto-gazeton

## VOĈO DE ISLANDO

Jara abono kostas nur 5 ŝil.

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
**Heronsgate, Rickmansworth, Herts.**  
**Anguloj**

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARO Julio-Aŭg. 1949

N-ro 525-6 (7-8)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵon en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.  
½ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

## EMINENTULOJ

Ideo penadanta por penetri publikan vivon dependas unuavice de la bonvolo kaj oferemo de homoj modestaj laŭ socia pozicio. Klarvidaj kaj idealismaj personoj de distinga pozicio iom post iom aliĝas kaj donas al la ideo sian nomon, iafoje monon kaj sian tempon. La skeptika mondo juĝas aferon laŭ la apogo, kiun altranguloj, oficialuloj, unuvorte **eminentuloj**, diras aŭ faras. Kia ajn estas la formo de la socio, ĉu kapitalista, ĉu komunista, la fenomeno restas la sama. La modernaj amasmovadoj konis la saman situacion kaj same serĉis simpatiojn kie ili povis trovi ilin.

La rolon de la eminentuloj en nia movado neniu ĝis nun tre atentis malgraŭ multaj ekzemploj. En la komenco de nia movado Grafo Tolstoj kaj la sanskrit-lingvisto Max Müller en Oxford publike sin esprimis por la ideo de internacia lingvo kaj de Esperanto. Ilin sekvis aliaj nomoj pli malpli konataj en pli vasta mondo. Post duonjarcento de la ekzisto de efektiva movado troviĝas sufiĉa materialo por prijuĝi la influon de la sociaj eminentuloj simpatiantaj al Esperanto aŭ eĉ aktive laborantaj por ĝi.

Oni povus klasigi ĉi tiujn eminentulojn proksimume jene :

1. Eminentuloj en kia ajn sfero, publike aprobantaj la ideon de la internacia lingvo kaj aparte Esperanton, sed ne praktikantaj la lingvon aŭ aktive laborantaj por ĝi. (Ekzemploj : Tolstoj, Max Müller, filozofo Ernest Naville, Princo Kopassis (Samos) k.a.).
2. Eminentuloj en kia ajn sfero kiuj praktike laboris por Esperanto, oferintaj tempon kaj iafoje multan monon. (Ekzemploj : Generalo Bastien, E. Archdeacon, Carlo Bourlet, Prof. Cart, Hector Hodler, H. B. Mudie, Ed. Stettler, Edmond Privat, por citi nur kelkajn).
3. La lasta klaso estus nun tiuj, kiuj aliĝis junaĝaj al Esperanto, partoprenis aktive ĝis certa tempo, grimpis la socian ŝtuparon kaj . . . plejofte forlasis ĝin. Por neniun ofendi, certa diskreteco ordonas, ne citi ekzemplojn en ĉi tiu kazo.

Kia nun estas la kaŭzo de ĉi tiu retiriĝo ? Verdire estas pluraj, kaj konvenas konigi ilin.

Unue estas la iluzioj, kiujn oni havis pri la publika preteco partopreni nian aferon. La longa penado sen la grandioza rezulto esperita malkuraĝigis multajn. Iafaje ankaŭ ia sento de necerteco kontraŭ mokema mondo kaj la opinio, ke persono sin okupanta pri tia *strangaĵo* ne povus esti normala. La dua plej ofta kaŭzo estas la nervokonsuma batalado pro bagatelaĵoj, la malsamsideana sintenado de aliaj aktivuloj, la senmezura kritikaĉemo kaj aliaj tiaj homaj ecoj. Kaj tria kaŭzo estas tre ofte la malamika rilato je Esperanto de la familianoj de tia eminentulo. Ciuj tiuj fenomenoj ekzistas ne nur en nia afero, tio estas komuna por ĉiu klopodo idealisma, ne komprenata centprocente de la samtempuloj.

Kial ni tuŝas ĉi tiun flankon de nia agado? Ĉar ni devas konstati, ke mankas al nia movado nuntempe la granda aro da eminentuloj, precipe tiuj el la kategorio 1 kaj 2. La unua mondmilito kun ĝia grava ŝanĝo en la socia strukturo, esprimita en la socia malapero de la mezaj klasoj, alivorte ia *proletariigo*, jam senigis nin de rezervujo, kiu estus kompensinta naturan perdon. Tial devus esti nia devo zorge atenti pri tiaj personoj, kiuj aliĝas al nia afero kaj kiuj povus ludi ĉi tiun rolon de eminentulo; ne tedi tiajn homojn per sensignifaj tempoperdigaj aferetoj, defendi ilin okaze de malinda atako kaj en rilatoj kun ili ne esti trudemaj, t.e. atenti societajn formojn. Fine, la kondukantaj personoj de nia movado ne forgesu la eminentulojn okaze de manifestacio, kongreso k.s. Ofte dankesprimo sincera konservas al nia afero valoran homon.

H.J.

### Internacia lingvo—Ĉu Esperanto?

Ankaŭ Afriko havas lingvo-problemojn. Eĉ tre grandajn. Kelkaj centoj da lingvoj estas parolataj de la kvin diversaj lingvo-grupoj. En la parto sude de la ekvatoro laŭdire oni parolas pli ol 200! Temas plejparte pri la Bantu-familio. Multaj Bantuaj scienculoj, i.a. D-ro Jacob Nhlapo, estro de la Instituto Wilberforce (lernejo) en Transvaal, Sud-Afriko, deziras unu skribformon por pluraj dialektoj. En Suda Rodezio ni jam pli-malpli atingis tion. Indiĝenaj infanoj komencas lerni sian dialekton lege kaj skribe (ekz. *Cikaranga*) sed de la kvara lerneja jaro lernas la *superan* lingvon de kvar dialektoj—la *Uni-Ŝonan* (Angle: Union Shona).

La misiistoj antaŭ 25 jaroj jam finis la tradukon de la tuta Biblio en Cikaranga, sed ĝi ne estis presita. Oni poste decidis pri Uni-Ŝona lingvo kaj entreprenis tute novan tradukon en tiu lingvo. Tio preskaŭ estas finita (de Brita kaj Eksterlanda Biblia Societo).

Oni krome faris ian miksaĵon de la Bantu-lingvoj kaj nomis ĝin *Basic Bantu* (baz-bantua) aŭ *Fanakalo*. Ĉu ĝi havos ian signifon, neniu povas antaŭdiri.

Mi jam multfoje pensis pri la valoro de Esperanto kiel solvo de la lingvo-problemo en Afriko. Mi parolis pri tio kun indiĝenaj instruistoj. Tamen en multaj partoj ili devas lerni la Anglan; aliloke la Portugalan, Francon, Afrikansan k.s. La Angla estas por ili tre malfacila, precipe la parolo. Tamen ili lernas ĝin. Kial? Ĉar la Angla lingvo estas tiel grava pordego al la sciencaj trezoroj de la mondo. Anglalingvaj libroj krome estas malplimultekostaj ol alilingvaj libroj samspecaj. La plej grava afero por indiĝenoj nuntempe estas akiri ĉiajn sciojn, kiuj povos praktike utili al ili. Tial la propagando de Esperanto ne prosperas ĉe ili.

J. Semmelink, Rodezio.

## RENKONTO KUN LA GENERAL-DIREKTORO DE UNESCO

### Senpartieco de UNESCO konfirmita

Responde al la letero de UEA datumita la 14-an de Marto, D-ro Torres Bodet, la Ĝeneral-Direktoro de UNESCO skribis la 21-an de Aprilo, tuj post sia reveno el Ameriko kaj Anglujo, ke en sia parolado de la 21-a Februaro (vidu *Esperanto*, Aprilo 1949, p. 46) li tute ne celis aludon al la lingvo Esperanto.

Poste, la 26-an de Majo, mi havis la plezuron diskuti kun li nian starpunkton dum vizito al UNESCO en Parizo. Lia akcepto estis tre afabla, kaj li kategorie certigis ke UNESCO neniel malamike rigardas al Esperanto, al kiu ĝi sintenas tute senpartie. Li klarigis, ke liaj komentoj pri artefaritaj lingvoj estis metafore faritaj por ilustri alian temon, kaj li tute ne havis Esperanton en siaj pensoj je tiu tempo.

Nia diskuto ne temis pri serĉo de specialaj privilegioj aŭ la alpreno de Esperanto kiel oficiala lingvo de UNESCO, sed pri la certigo, ke oni ne distingos kontraŭ ni pro hazardaj antaŭjuĝoj aŭ miskomprenoj sen laŭcela kaj ĝusta kontrolo de la faktoj. Mi forlasis la intervjuon kun la plena fido, ke pri niaj justaj petoj por la objektiva sinteno de UNESCO al nia afero ni ne havos kaŭzon por dubo en la estonteco, kaj ni povas konsideri la pasintaĵojn kiel fermitajn aferojn.

Pri la personeco de la Ĝeneral-Direktoro mem mi ricevis plej agrablan senton de sincera kaj senpartia objektiveco. Li estis Ministro por Ekstero kaj Ministro de Edukado en Meksikio, kun fama pasinteco kiel administranto kaj verkisto, kaj el mia vizito al UNESCO mi ricevis la impreson ke tiu organizaĵo estas en kapablaj kaj bonaj manoj.

Mi renkontis ankaŭ plurajn aliajn oficistojn de UNESCO; ili donis multe da impresaj informoj pri la funkciado de tiu organizaĵo, kaj mi revenis kun la plena konvinko ke ĝiaj celoj estas tre salutindaj kaj valoras la pripenson kaj subtenon de la Esperantistaro en ĉiu lando. Sed pri tio mi parolos alian fojon.

E. D. Durrant,

Komisiito de UEA pri rilatoj  
kun UNESCO.

Chr. Sl. :

### Albuma folieto

Vi estas juna, freŝa, pura,  
bril-brunokula, belstatura,  
Poem' pri vi—alloga temo,  
sed kion diri?

Vi ĝin malpermesas,  
se per vorteto oni vin karesas . . .  
Kaj kial verki ĝin?

Vi mem estas poemo.

### Birdoj Londonaj

Kiu ne konas Londonon, eble kredas, ke ĝi estas dezerto de konstruaĵoj kaj pavimoj, sed tio ne estas vera. Kredeble apenaŭ ekzistas urbo tiom granda, kiu posedas eĉ en sia mezo tiom da grandaj parkoj, erikejoj kaj simile, kie herbo kaj arboj kreskas, lagoj troviĝas kaj la naturo funkcias. Tamen mi intencas skribi, ne pri la cignoj de kelkaj partoj de Tamizo, nek pri la anasoj kaj sturnoj, kiuj ĉiuaŭtune kolektiĝas en Londono por sudena migrado. Mi volas paroli pri nur tri specoj de birdo, kiuj estas, kiel la homo, urbanoj; kiujn oni preskaŭ povus nomi *stratbirdoj*.

Unue pri la mevoj de Londono. Ĉiu loĝanto de apudmara lando scias, ke la mevoj ne sole estas marbirdoj, sed amas serĉi laŭeble sian nutraĵon sur la tero. Precipe dum la vintro ili vizitas Londonon kaj ju pli severa la vintro, des pli grandnombre ili alvenas. Ili sin montras tre lertaj pri kaptado de manĝopecoj (lardoŝelo, paneroj k.s.) dum la flugado kaj la vizitanto povas sin distri ĵetante pecojn por ke ili kaptu ilin en la aero. Ili tamen estas vere sovaĝaj kaj ne lasas sin preni de homo. Nur unu fojon mi prenis mevon. Tio okazis dum tre densa nebulo antaŭ multaj jaroj. Ĝi ŝajne kunpuŝiĝis kun konstruaĵo aŭ kamentubo. Ni lasis ĝin tranokti en kelo de la domo kaj en la mateno mi prenis ĝin kaj liberigis ĝin ĉar la nebulo malaperis. Ĝi tuj forflugis, do ĝi supozeble ne multe vundiĝis.

Ankoraŭ unu birdo Londona estas la pasero. Ĝis tia grado ĝi estas tipa Londonano, ke oni ofte nomas la Londonan homon mem *pasero* (angle: Cockney sparrow. *Cockney* estas aparta Londona tipo). Tion oni faras pro lia memfido kombinita kun gajeco eĉ en cirkonstancoj embarasaj aŭ deprimaj. Tiu nomo tamen ŝajnas al mi misepiteto ĉar la paseroj, kiel ankaŭ la homoj, montras inter se ĉiajn karakterojn. Tiuj birdoj tute diferencas unuj de aliaj—unuj pacemaj, aliaj batalemaj, unuj fortikaj, aliaj malfortaj, unuj trudemaj, aliaj timemaj. Ĉe ili efektive troviĝas tuta universo tre simila laŭ multaj rilatoj al la mondo homa. Afero ne ordinare rimarkata de la homoj estas la beleco de multaj paseroj, laŭ formo, sed ĉefe laŭ koloro. Ne ĉiuj havas unu grizan aŭ brunan koloron, sed montras ĉian nuancon de grizo kaj bruno kun strioj nigraj intermiksitaj eĉ ĉe la sama birdo, laŭ treege belaj kaj plaĉaj desegnoj.

Fine pri la kolomboj. Mi ne scias, ĉu ĉiu grandurbo posedas aron da kolomboj, kiel ĉe Londono. Ĉe ni tamen ili estas troveblaj sur preskaŭ ĉiu placo kaj ĉiu konstruaĵo. Multaj nestas, supozeble, en la parkoj, sed multegaj nestas ĉe la konstruaĵoj mem, ĉe Somerset House, Katedralo de S-ta Paŭlo, Placo Trafalgar k.s. Antaŭ kelkaj jaroj ili fariĝis tiom ĝenaj, ke oni devis ekstermi multajn.

Rava bildo estas ĉe Placo Trafalgar ĉe la piedo de la altega kolono de Lordo Nelson, la Angla marheroo. Tie en ĉiu horo de la tago oni povas vidi amason da infanoj nutrantaj la kolombojn per greno. Pli ĉarman bildon ol infanon kun unu, du, eĉ tri kolomboj sur la brakoj bekantaj delikate la flavajn grajnojn oni ne povus imagi.

Vizitantoj al la Antaŭkongreso povos kapti per siaj kameroj belajn memoraĵojn per la birdoj de Londono.

J. A. Smith.

### Esperanto en scienca gazeto

En numero 1 de volumo 3 de la grava japana teori-fizika gazeto *Progress of Theoretical Physics* (Januaro-Marto, 1948) aperis artikolo verkita tute en Esperanto de Jei Yosida kaj Syohei Miyahara. La titolo estas: Pri la Teorio Alojteorimaniera de Feromagnetismo. La artikolo estas okpaĝa (p. 74-81). Super la artikolo troviĝas mallonga (seplinia) resumo en la angla lingvo, kiu cetere estas la ĉefa lingvo de ĉi tiu gazeto.

En numero 4 de volumo 3 de la sama gazeto (Oktobero-Decembero 1948) aperis *Letter to the Editor* (letero al la redaktoro) de F. J. Belinfante tute verkita en Esperanto (sen angla-lingva resumo). La letero estas dupaĝa (p. 460-462) kaj ĝia titolo estas *Supermultatempa Teorio por Mezonoj*.

Ni esperas baldaŭ anonci novan artikolon en Esperanto en ĉi tiu tre grava scienca gazeto, kiu trovas intereson inter teoriaj fizikistoj ankaŭ ekster Japanlando pro la gravaj kontribuoj de la japanaj fizikistoj al la teorio de elementaj korpuskloj publikigataj en ĝi.

La gazeto estas eldonata de Akitaya Co. Ltd., Osaka & Kyoto, Japanlando. Apartaj numeroj aŭ abonoj estas mendeblaj ĉe Akademeia Press Company Ltd., Foreign Division, Ginza Midori-Building 3, 5-Tyome Ginza, Tokyo, Japanlando; aŭ ĉe The F. W. Faxion Company, Subscription Agency, FAXION Building, 83-91 Francis Street, Back Bay, BOSTON 15, Mass., Usono. La prezo ne estas indikita.

M. Soloviev :

### Migrinto

La samaj estas suno, maro, floro . . .  
Sed jam forestas viva energio,  
Dolor' netera—en malsana koro,  
Kaj nestas en okuloj nostalgio.  
Simile, iu flor' el land' tropika  
Aeron fremdan tute ne elportas;  
Kaj malgraŭ akvo, varm', kaj sun' efika,  
En luksa vazo velkas, kaj finmortas.

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Ĉeĥoslovakujo

Enmaniĝis al ni la programo de la VII-a Ĉeĥoslovaka Kongreso Esperantista enhavanta la Jarraporton de ĉiuj fakoj de la tiulanda movado. Ni ankoraŭfoje konsilas al la landaj asocioj imiti la modelan ekzemplon de la ĉeĥoslovaka organizaĵo tiel prezenti kun stereoskopa klareco ĉiun fazon de la farita laboro.

## Aŭstrujo

Dum la lasta tempo la aŭstraj Esperantistoj povis raporti pri diversaj sukcesoj atingitaj. La plej nova estas, ke la aŭstra ŝtata trafikoficejo oficiale starigis en sia kadro specialan Esperanto-sekcion.

La sukceso de tiu entrepreno dependas de tio, ĉu la Esperantistoj mem apogas ĝin. Skribu do grandamase al la oficejo gratulante aŭ petante informojn pri Aŭstrujo. Ĉiu skribinto cetere ricevos belan prospekton pri Aŭstrujo afrankitan per la nova Esperanto-poŝtmarko.

Se Esperantisto pro iu ajn kaŭzo venos Aŭstrujon, nepre petu informojn de tiu centro, kaj uzu Esperanton. La centro povas trakti ĉiajn aferojn turismajn, ĉu unuopajn vizitojn, ĉu karavanojn kaj donas ĉiajn helpojn kaj konsilojn. La adreso estas: Aŭstria Trafikoficejo/ Esperanto-sekcio, Friedrichstrasse 7, Wien I, Aŭstrujo.

## Belgujo

Ĉi-jare la Genta sekcio invitis la Flandrajn Esperantistojn al kongreso. Pli ol cent partoprenantoj venis el ĉiuj anguloj de Flandrujo. Eĉ deko da Nederlandanoj, i.a. S-ro Mabeŝone, kasisto de L.E.E.N. ĉeestis. Inter la ĉefaj programeroj ni citas ĵurnalistan konferencon, radio-intervjuon, kunvenon de instruistoj, la jarkunsidon kaj viziton al famaj Gentaj monumentoj.

La sekcio Bruĝo prizorgis varietean vesperon, ĉe kiu muzikis la ĉampiono de la akordiono por Eŭropo, F-ino Debrabandere.

La 14-a kongreso de Fl.L.E. certe forte impresis la partoprenantojn.

\* \* \*

Por efike propagandi, Flandra Ligo Esperantista interkonsentis kun diversaj flandralingvaj gazetoj kaj monataj revuoj, ke ili aperigu sufiĉe regule artikolojn, komunikojn kaj sciindaĵojn pri Esperanto kaj movado. Oni tiel sukcesis en 1948 kaj dum la unua parto de 1949 aperigi anoncojn pri la plej trafaj okazintaĵoj de nia movado en la tuta mondo, po 30 anoncoj aŭ komunikoj ĉiumonate en diversaj gazetoj. Oni precipe tradukis la komunikojn ricevitaĵojn el eksterlando kaj kiuj traktis Esperanto-venkojn (ekzemple,

Esperanton en la lernejoj, eldonon de turistaj broŝuroj, elsendojn per radio k.s.) kaj enpresigis ilin en la landa gazetaro.

\* \* \*

Reĝa Belga Ligo Esperantista okazigis sian 33-an kongreson je Pentekosto en Bruĝo, ĉefurbo de la provinco Okcidenta Flandrujo. Geamikoj el Anglujo, Francujo, Nederlando kaj Svedujo ĉeestis.

Sabate 5-an de Junio okazis fruktodonaj laborkunsidoj, kiujn sekvis interkonatiĝa vespero agrabligita per gajaj prezentadoj. En la muzika parto S-ino Lefebvre-Janssens virtuoza per la fortepiano-konĉerto de Grieg. Dimanĉe Pastro J. M. De Corte faris belan predikon en Esperanto dum meso. Sekvis afabla akcepto de la kongresanoj en la gotika urbdomo kaj la urbestro esprimis bondeziron al la Esperanto-movado.

La kongreso aprobis multajn decidojn pri estonta programo kaj difinis diversajn agadterenojn de propagando.

## Francujo

Ankoraŭ unu grupo sukcese ekspluatis la infanajn desegnojn ricevitaĵojn de S-ro R. Levin—Grupo Angers. Sub patroneco de la Urbestro, Akademia Inspektoro, unuagrada inspektoro kaj la gedirektoroj de la altnivelaj lernejoj de la urbo, la ekspozicio estis inaŭgurita de la Prefektoro kaj daŭris de 30-a de Aprilo ĝis 12-a de Majo. La unuan fojon Esperanto ricevis oficialan rekonon en Angers. La diversaj gvidantoj, artistoj, pedagogoj kaj aliaj multe entuziasmis pri la desegnoj kaj pasigis tutajn tagojn ekzamenante ilin. Post multnombra partopreno de infanoj el la diversaj lernejoj, oni inaŭguris konkurson por ili, kaj tio duobligis la propagandon. La ekspozicio multe superis la atendojn de la lokaj aranĝintoj, kaj ili tre insiste admonas aliajn grupojn profiti tiun belan okazon loki Esperanton praktike antaŭ gravajn instancojn.

## Jugoslavujo

En Jugoslavujo Zagreb estas centro de esperantista vivo, kaj la tiea esperantista societo "Bude Borjan" unu el la plej grandaj esperantistaj societoj en nia lando. Pro la alfluo de novaj, junaj fortoj, lastatempe oni rimarkas konsiderindan plilarĝiĝon en la ĉi tiea esperantista vivo.

Malgraŭ la valutaj malfacilaĵoj, en konkurso pri varbado por UEA Jugoslavujo, kiu en la komenco staris en la 22a loko, hodiaŭ atingis fiere la unuan lokon. La sekreto de tiu surpriza sukceso estas facile klarigebla: ĝin oni devas danki al bona laboro de ĉiuj fervoraj gesamideanoj. La jugoslavaj esperantistoj penos resti en la honorloko ĝis la fino de la konkurso.

Nun estas gvidata de D-ro Ivo Lapenna kurso

por kursgvidantoj, kiun partoprenas 30 gesamideanoj. Grandan intereson pri Esperanto, precipe inter la junularo, vekis efikplena esperanta montrofenestro de butikoj en la urbocentro.

La 20-an de Majo la Zagrebaj esperantistoj okazigis en sia societejo aranĝon okaze de la 40-jara jubileo de la *Kroata Esperantisto*, redaktata de malnova pioniro S-ino Danica Bedeković. La aranĝo estis tre sukcesa kaj allogis multe da vizitantoj. Interesa program-punkto estis baletoj efektivigataj de niaj junuloj. Menciinda estas la partopreno de 4-jara Vesna Vanĉik, kiu brile recitis "Heliketo, heliket'" de Kalocsay.

### Hungarujo

La XIX-a Hungara Landa Kongreso okazis kun 130 partoprenantoj en Gyula. La vicdepartementestro mem salutis la kongreson en la departementa salonego. La stacidomo estis feste ornamita per Esperantaj kaj diversnaciaj flagoj. La alvenintojn akceptis orkestro kaj geknabaj trupoj, kiuj kun flirtantaj flagoj kondukis la marŝantojn al la urbdomo. Re-rezentantojn sendis la hungara Sindikata Konsilantaro kaj multaj gravaj sindikatoj. La prezidanto de la kongreso, D-ro L. Blanár, prezidanto de la loka Laborista Partio, salutis kaj emfazis la samecon de celoj de la partio kaj de la esperantistoj. Julio Baghy faris festparoladon.

Dum jarkunveno de H.E.S. oni parte reelektis la malnovan estraron. La kongreso deklaris, ke la movado estu adaptata al la programo kultura kaj socia de la Sindikata Centro.

\* \* \*

La Hungara Sindikata Centro decidis, ke ĝi prenus la Esperantomovadon sub sian patronadon. La gvidantaro de H.E.S. estos reorganizata kaj post la novaj elektoj oni akordigos ties laboron kun la sindikata kulturlaboro. Espereble tio alportos pli certan bazon kaj bonan progreson al la hungara movado. En kelkaj sindikatoj jam funkcias Esperanto-grupoj.

### Pollando

La sesdekpaĝa ilustrita broŝuro *Nuntempa Pollando* ankoraŭ estas ricevebla kontraŭ unu respondkupono ĉe Asocio de Esperantistoj en Pollando, Marszałkowska 81/32, Varsovio. Ĉiuj personoj, kiuj konfirmas la ricevon de tiu broŝuro ricevos senpage ankaŭ la novan broŝuron pri Mickiewicz, Slowacki kaj Chopin nun preparatan.

### Esperantistaj sportuloj

Por efike agadi inter sportuloj necesas ke Esperantistaj sportuloj kunvenu dum la kongreso en Bournemouth por diskuti metodojn de agado. Interesatoj sin turnu al Fakdelegito por sporto Frank Johansson, sportinstruisto, Box 20015 Stockholm, Svedujo.

## INTERNACIA KONKURSO 1949

### Stato je la 31a de Majo 1949

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	2165	135.3
2. Svedujo ..	4100	4694	114.5
3. Portugalujo	700	755	107.9
4. Belgujo ..	1700	1700	100.0
5. Aŭstralio ..	950	890	93.7
6. Nederlando	5400	4972	92.1
7. Usono ..	3000	2703	90.1
8. Svislando ..	1400	1255	89.6
9. Urugvajo ..	250	220	88.0
10. Nov-Zelando	900	779	86.6
11. Britujo ..	13000	11168	85.9
12. Danlando ..	3200	2710	84.7
13. Brazilo ..	2000	1679	84.0
14. Polujo ..	4000	3320	83.0
15. Italujo ..	1600	1225	76.6
16. Finnlando ..	2000	1520	76.0
17. Germanujo ..	1600	1190	74.4
18. Sud-Afriko ..	250	185	74.0
19. Egiptujo ..	300	215	71.6
20. Norvegujo ..	1300	915	70.4
21. Kanado ..	300	210	70.0
22. Argentino ..	900	605	67.2
Francujo ..	6200	4164	67.2
23. Hungarujo ..	1800	1170	65.0
24. Islando ..	500	315	63.0
25. Irlando ..	300	160	53.3
26. Aŭstrujo ..	1000	470	47.0
27. Palestino ..	400	160	40.0
28. Hispanujo ..	1200	450	37.5
29. Bulgarujo ..	1600	250	15.6
30. Ĉeĥoslovakujo	5300	415	7.8

Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro kompare kun la fiksita kvoto, UEA donos premion £10. Ĉiu delegito en la koncerna lando ricevos libropremion.

### Mondcivitanoj—Mondlingvo

La nova movado de la mond-civitanoj, iniciatita de Garry Davis, estas nur sekvo de natureca evoluo. Ekzemple en Germanujo okazis la sama sur malgranda teritorio. La multaj provincoj kaj malgrandaj landoj interne de la nuna Germanujo kunigis sin al popolo Germana kun unu altgermana lingvo. Ĉu tio okazis per milito aŭ sen milito estis afero de pli aŭ malpli granda intelekto de iamaj gvidantoj. Kio estas la altgermana lingvo por la dialektoj de la Germana popolo, tio estas la lingvo Esperanto por la diversaj lingvoj inter la popoloj. La teknika epoko evoluigos laŭ tiu direkto. Ĉu tio okazos per milito aŭ sen milito, estos afero de pli aŭ malpli granda intelekto kaj logikemo de la nunaj kaj estontaj ŝtatgvidantoj de la popoloj. Se ili ne estos kapablaj por tio, kaj ne volos, tiam la popoloj mem decidus. La unuan pionirpaŝon faris Garry Davis. La popoloj, ĉiuj popoloj, deziras pacon.

Armin Schorcht.

## PRI NEOLOGISMOJ

Responde al artikolo samtitola aperinta en la Maja numero de *Esperanto* kaj verkita de samideano J. Saldanha Carreira, la redakcio ricevis diversajn esprimojn de opinio. La temo meritas la atenton de ĉiu lingve interesita Esperantisto kaj laŭ ĉi tiu vidpunkto ni represigas unu el la ricevitaĵoj. *Red.*

La artikolo de S-ro Carreira en la Maja n-ro de *Esperanto* turnas okulon de prudento sur la demandon pri la neologismoj.

Ke entute povas ekzisti demando pri la neologismoj estas malgaja konstato. Ĝi indikas senmovan sintenon ĉe parto de la Esperantistaro. Kaj en la regno de la vivo, kio ne iras antaŭen iras malantaŭen kaj pereas.

La opono al la evoluo de la lingvo per neologismoj estis fenomeno ne ekzistanta dum la vivo de Zamenhof, kiu konstante pliriĉigis la lingvon per centoj da neologismaj vortoj dum la plenumado de kuraĝaj literaturaj taskoj.

Vere, en la teknikaj fakoj oni ĝenerale konsentas la neceson de novaj terminoj. La viva intereso nun vastiĝanta pri Kompleta Vortaro estas sana signo pri tiu progresejo. Sed tio, ĉu ne, estas ne *neologismoj* sed *teknika terminaro*—esprimo, kiu vekas neniun pasion. Sed *neologismoj!*—Dio gardu!—fariĝas ĉe multaj vorto de teruro kaj tabuo, simile kiel certaj aliaj vortoj kun tre simila finaĵo!

La neologismoj, do, estas la teknikaj terminoj de la literaturo, eventuale ankaŭ de la familiara konversacia lingvo. Se la literaturaj laborantoj diras, ke ili bezonas certan nombron da tiaj vortoj, kial fari rezistadon? Neologismoj estas por neniun devigaj; ili estas nur konjekte uzataj ennovaĵoj, kiuj prosperas aŭ ne prosperas.

Ĉiu natura lingvo neologismas konstante kaj senĝene. Se ni pretendas, ke ankaŭ nia lingvo estas lingvo vivanta, ni do lasu ankaŭ al ĝi tiun liberon. Alie ni sufokas ĝin.

Por ĉiu, kiu iom rigardis la neologismojn en ilia viva kadro—la literaturo—estas evidente, ke ĝenerale ili estas tie enportitaj el neceso samgrade premanta, kiel ĉe verkado de teknikaj libroj.

La *Infero*-traduko de Kalocsay—verŝajne la apogeo de nia ĝisnuna poezio, kiu superas almenaŭ ĉiun el la ses anglaj tradukoj, kun kiu mi komparis ĝin—estus estinta ne ebla sen la dozo da neologismoj—cetere tre modera—kiun Kalocsay tie aplikis. Persone mi preferas havi la *Infero*-tradukon kun la neologismoj, ol sen neologismoj neniun tradukon de tiu ĉefverko. La samon mi opinias ekzemple pri la Zamenhofaj tradukoj de *Hamleto*, *Ifigenio* kaj *La Revizoro*—ĉiu el ili enhavas vortojn siatempe (kaj kelkajn eĉ nun!) neologismajn, sed mi preferas havi en la lingvo

tiujn klasikaĵojn (kun ties neologismoj) ol tute ne havi ilin.

Cetere, se iu malkonsentas, tiu povas serene agi, kvazaŭ la diritaj verkoj ne ekzistus, kaj tiam ĉiu povas esti kontenta. Efektive, por tiu, kiun ne tuŝas la belliteraturo, tiuj verkoj (kun ties ĝenaj neologismoj) vere ne ekzistas; simile kiel ne ekzistas la radifakaj neologismoj de *Fine Mi Komprenas la Radion* por tiuj, kiuj ne legis la Ajsbergan verkon.

Tamen mi konsentas, ke D-ro Kalocsay agis iom neprudente, publikigante en *Parnasa Gvidlibro* longajn listojn de neologismoj *ekzistantaj* kaj *proponataj*. Tiu *koboldo* efektive timigas multajn mildajn samideanojn, kiuj pro teruro ne rimarkas, ke Kalocsay mem ne uzas en sia tuta granda verkaro eĉ la dekonon de tiuj vortoj! La ceterajn li nur volis liveri helpeme al literaturaj laboremuloj ne havantaj mem la kompetenton krei tiajn vortojn en okazo de bezono. Do helpeme li faris, kaj tamen neprudente. Ĉar verŝajne tiu listo kaŭzis la pliparton de la panika (respektive statika) oponado.

Dum de unu flanko iuj Esperantistoj kondamnas kaj volas ekzorci el la lingvo la beletrajn neologismojn, de alia flanko aŭdiĝas de tempo al tempo plendoj pri la malalta staturo de niaj literaturaj verkoj. Kaj tie ni konstatas ofte la konsternan nescion pri niaj efektivaj literaturaj valoroj. Se nia literaturo povus esti pli impona laŭ amplekso, ni almenaŭ ne fariĝu niaj propraj malamikoj, ignorante la grandajn verkojn, kiujn ni ja havas. Ni havas *Sinjoro Tadeo*, *La Tragedio de l'Homo*, *Eŭgeno Onegin*, *Eterna Bukedo*, *Infero* kaj *Johano la Brava*. La du unuaj, laŭ mia scio, estas ĝis nun tute ne tradukitaj en la ĉiopovan anglan lingvon! (De *Pan Tadeusz*—*Sinjoro Tadeo*—ekzistas nur proza traduko; kaj proza traduko de poezia verko simple ne estas traduko.). De *Eŭgeno Onegin* aperis angla traduko nur en 1948. La tre bona Esperanta traduko de Nekrasov eliris en 1931.

Krome ekzistas la belaj kaj imponaj antologioj, inter kiuj mi mem plej amas la hungaran kaj ĉeĥoslovakon.

Nia originala poezio jam pompas per *Pilgrimo* (Baghy), *Streĉita Kordo* (Kalocsay), *La Tajdo* (Hojlov), *Mia Spektro* (Kurzens), *Prologo* (Mihalski) kaj aliaj volumoj. En Budapeŝto kuŝas ankoraŭ de Kalocsay dua originala poemaro *La Floroj de l' Malbono* kaj eĉ tria originala poemaro (la du lastaj ne presitaj). La grandiozaj novaj poemoj de tiu senlaca geniulo, kiuj aperas en la kajeroj de Literatura Mondo, vekas la plej ekscitajn atendojn pri ĉi tiu nova kolekto.



Kiam ili eldoniĝos? Kaj de kie venos la iniciato por eldoni ilin?

Sobre mi diras, ke nia poezio jam valoras tion, ke oni lernu Esperanton nur por povi ĝin legi. Nia plej bona poezio staras alte—ne nur en la Esperanta kadro, sed alte absolute. Do necesas, ke ni ekkonu tiun fakton kaj disdiru ĝin al malŝatemuloj.

Kaj ni konigu ankaŭ inter ni mem la dignan staton de nia literaturo, kiu jam havas la povon kateni al la lingvo valorajn homojn, kiuj sen tio forirus. Mi jam spertis pri tiaj okazoj.

Kaj tiu fierinda stato de nia literaturo—precipe de la poezio—ebligis dank' al la klera kaj kuraĝa apliko de necesaj neologismoj. Sekve ni ne sabotu per miopaj kaj malvastaj antaŭjuĝoj la evoluantajn trezorojn de nia kulturo!

*Reto Rossetti.*

### Al Lucasta

*Richard Lovelace, 1618–1658*

*Ne min juĝu, Kara, tro severa,  
Se de viaj revmedito,  
Ĉasta brusto, menso senkolera,  
Mi foriras al milito.*

*Vere, nova amo jam min tenas  
La unua en batalon;  
Kaj pro plia fido mi alprenas  
Glavon, ŝildon kaj ĉevalon.*

*Tamen, Kara, vi pardonos min  
La pekon kontraŭ via koro:  
Mi ne povus tiel ami vin  
Sen amo plia al honoro.*

*trad. Brendon Clark.*

**Vojislav Ilić :**

### Ĉe Vardar'

Ĉielen leviĝas fiere la griza rokaro;  
Super profundaj abismoj jen agloj kaj nuboj  
batalas;

Malsupre kun bruo terura rapidas kaj ŝaŭmas  
Vardaro,

Kaj pluen tra monta fendaĵ' bluan maron Egejan  
enfalas.

Ho, ondoj! Ho, nia rivero! Pereas ja tiel  
jarcentoj;

Kiel la ondoj dronantaj en mar' de nebula eterno,  
Kaj perla ŝprucaĵ' via kisas piedojn de la  
monumentoj

De gloro popola estinta, pasinta dum jara alterno.

Sed kvazaŭ Feniks' paradiza ekbrilos la ĉarma  
libero!

Tiam denove mi tie ĉi staros kun kor' ĝojabunda  
Kaj agl' nia blanka etendos flugilojn en klara aero  
Super val' nia profunda . . .

*elserbigis M. Soloviev.*

### “Ĉirkaŭ nova libro”

(La artikolo pri la libro *Leteroj de L. L. Zamenhof* evidente penigis aron da legantoj, kiel montras pluraj korespondaĵoj ricevitaĵoj ĉe la redakcio. Ni opinias utile presigi unu el ili pro ĝia lingva karaktero. Samideano Padfield titoligis ĉi tiun respondon *Defendo de Zamenhof*. Redakcio.)

S-ro George Rust en sia artikolo pri *Leteroj de L. L. Zamenhof* skribis pri Zamenhof: Ankoraŭ tamen li ĉagrenas niajn orelojn dirante *siatempe* (anstataŭ *ĝiatempe*), *ne ankoraŭ* (anst. *jam ne*), *danki por* (*danki pro*) kaj *parolas en Esperanto* (*per*).

En la frazo: *Via letero de 21.VI. siatempe alvenis* la uzo de *ĝia-tempe* estus mallogika. Laŭ severa logiko oni devus uzi jen *siatempe* jen *ĝiatempe* laŭ la frazo sed tia diferencigo postulus momentan pripenson kaj estus aparte ĝena por la parolantoj de la slavaj kaj aliaj lingvoj en kiuj oni uzas *siatempe* sen diferencigo. Ĉi tiu kutimo estas oportuna kaj ne kondukas al malkompreniĝo.

*Danki por*—preskaŭ ĉiam uzita de Zamenhof—estas laŭ la parolmaniero de la naturaj lingvoj. La malpli natura *danki pro* estas verŝajne parte bazita sur la erariga aserto, ke Zamenhof uzadis *pro* por motivo kaj *de* por kaŭzo. Tiu malveraĵo estas forigita el la ĵus aperinta nova eldono de tre konata angla lernolibro.

*Parolas en Esperanto* ankaŭ estas pravigita de la kutimo de naturaj lingvoj.

Aplikeblaj al ĉiuj tri supraj demandoj estas la vortoj de Zamenhof: . . . en nia pure praktika afero la neoportuna teoria logiko devas cedi al la pli oportuna kutimo de la popoloj . . . ” (*Leteroj de L. L. Zamenhof*, p. 243).

En la *Leteroj* troviĝas multaj esprimoj kiel *Ne venis ankoraŭ la ĝusta tempo* (p. 244) kaj *ĝi ne estas ankoraŭ preta* (p. 267), sed nenie mi rimarkis *ne ankoraŭ* sen vorto inter *ne* kaj *ankoraŭ*, kaj mi permesas al mi dubi, ĉu Zamenhof efektive uzis formon tiel kontraŭan al sia kutima stilo. Tute logike en la verkoj de Zamenhof *ankoraŭ* montras ĉiam, ke la nuna stato similas la antaŭan—ŝanĝo ĝis nun ne okazis—kaj estas indiferece ĉu *ankoraŭ* staras antaŭ *ne* aŭ post la verbo; sed se ĝi staras tuj post *ne* la *ne* efikus sur ĝia senco, kiu fariĝus duba. Simile *jam* montras, ke ŝanĝo okazis, egale ĉu ĝi staras antaŭ *ne* aŭ post verbo, sed ĝi ne devus stari tuj post *ne*. La skribmaniero de Zamenhof estas tute regula kaj logika ĉe tiu punkto.

*W. W. Padfield.*

Ricevitaj: **Innsbruck en somero** kaj **Kuraĉloko Igls**: ilustritaj prospektoj senpage riceveblaj ĉe: Esperanto-Landesleitung f. Tirol, KUFSTEIN, Aŭstrujo.

## POR VIA KURSO

En 1948 mi analizis la vortojn de miaj korespondaĵoj por eltrovi la vortojn, kiujn ni Esperantistoj plej ofte uzas, precipe dum korespondo aŭ parolo. Ĝenerale, oni skribas leteron kiel oni parolas, kaj mi juĝis, ke analizo de letervortoj sufiĉe validos ankaŭ por parolvortoj.

Mi analizis entute 10.000 vortojn el 50 leteroj kaj 25 poŝtkartoj reprezentantaj 40 landojn. Kiam mi trovis novan radikon mi skribis ĝin en la liston; kiam mi denove trovis tiun saman radikon mi faris strekon kontraŭ ĝi. Tiamaniere mi fine povas kalkuli kiom da fojoj la diversaj korespondintoj kunkune uzis tiun radikon. La rezulto estas interesa, miriga kaj utila, precipe por la instruantoj de nia lingvo; ĉar mi trovis, ke 35 radikoj reprezentas proksimume 50% de la 10,000 vortoj! Tio diras, ke ĉiu lernanto, kiu scias parkere tiujn 35 radikojn, povas skribi proksimume 50% de ĉiu sia letero sen helpo de la vortlibro! La lastatempa sperto de miaj klubanoj konfirmas tiun konkludon.

Kompreneble, diversaj cirkonstancoj, ekzemple la interesoj, metio, sekso, geografio, politiko kaj religio de la skribanto, povas efiki sur la vortojn de liaj korespondaĵoj; sed mi ellasis el mia kalkulo tiujn vortojn kiuj ŝajnis al mi nesufiĉe ĝeneralaj. Tamen, se mi mem estus sinjorino anstataŭ sinjoro, la sufikso *in* sendube troviĝus inter la plej oftaj. Cetere, mi kredas, ke aliaj kalkulantoj trovis la saman rezulton ĉe la unuaj tri listoj. Ili eble konkludus iomete malsame rilate al la postaj listoj, sed la diferenco estus negrava.

Jen estas la unuaj listoj:

I. (200 fojojn k.s.):	II. (100-199):
mi 657	ke 154
la 643	ni 153
vi 407	ne 140
kaj 311	al 123
est 284	por 112
de 253	pri 108
en 216	
7 vortoj: 2771 = 27.71% !	6 vortoj: 790 = 7.9%

III. (50-99):	
leter 93	skrib 63
kun 92	sed 63
mal 91	land 60
Esperanto 82	pli 59
tre 80	ricev 57
samideano 79	ĉi 57
pov 78	ebl 55
kiu 78	ankaŭ 54
ig 78	hav 53
korespond 73	jar 53
tiu 70	lern 53
ĝi 65	se 53
iĝ 64	
22 vortoj: 1470 = 14.7%	2 sufiksoj 142

Entute 35 radikoj reprezentas 5031 el 10.000 vortoj, t.e. 50.31% el ĉiuj uzitaj vortoj.

Por via intereso mi aldonas du pluajn listojn:

- IV. (40-49): nun 49, el 49, aĵ 49, ĉar 48, unu 48, ist 46, ad 46, bon 46, nur 45, send 44, tio 44, dev 42, in 42, tut 42, alia 41, jam 41, lingvo 40, salut 40.
- V. (30-39): interes 39, ili 38, leg 38, amik 37, aŭ 37, estim 37, mult 37, pro 37, respond 36, dank 36, ej 36, antaŭ 35, kiel 35, plej 35, pet 34, ĉu 34, temp 34, sci 33, per 33, far 33, an 32, adres 31, dezir 31, oni 31, sam 30, don 30.

Ĉe la fino de la VIa listo, la nombro de la radikoj estas 104, kaj la procento entute 72.69%; la afiksoj 15. Ĉe la fino de la IXa listo (10-11 foja ofteco) la radiknombro estas 186 kaj la procento entute 82.64%. Neniu afikso troviĝas en la listoj VII, VIII, IX, t.e. inter la oftecoj 10-19.

*Brendon Clark, Nov-Zelando.*

## La rido

Ju pli ci lernas ridi despli libera ci estos. Ju pli libera ci povas ridi, despli serioza vi staras kontraŭ la aferoj de la vivo, kiuj nur evidentiĝas sekve de serioza akcelado.

\* \* \*

Ju pli la homo kapablas esti serioza, despli kore li povas ridi.

\* \* \*

Oni parolas tro facilanime pri la ridado; ĝi estas tamen unu el la plej seriozaj aferoj de la homaro.

\* \* \*

Perdita estas la tago dum kiu oni ne ridis.

\* \* \*

La rido estas nenio alia ol fulma ekbrilo de la animĝojo . . . . ekflamiĝo de la lumo al ekstero, tiel kiel ĝi brilas interne.

\* \* \*

Kiu povus ridi pri ĉio, tiu-ĉi regus la mondon.

\* \* \*

La rido estas al ni donacita, tiel ke ni povu ridi pri ni mem sed ne pri niaj proksimuloj. Kiu ne havas la kuraĝon ridi pri si mem, prefer neniam ridu.

\* \* \*

La plej efika zorgado por resti bela: Rideto.

\* \* \*

Evidentiĝis ke ne estas la manoj per kiuj la homoj sin tenas kaj altiras sed la rideto.

\* \* \*

Rido patrina estas beno por la tuta domo.

\* \* \*


Rido estas sano, ĝojo estas balzamo; sed anima trankvileco estas la fonto de la rido kaj la konservejo de la ĝojo.

\* \* \*

Rido estas sanigilo, kies trankviligan forton oni ne sufiĉe kalkulas.

# TRA LA LIBRARO

\*=akireblaj ĉe U.E.A.



**\*La Gajaj Edzinoj de Windsor**, de W. Shakespeare; trad. Stephen A. Andrew; eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. 1949. 90p., 18.5 ×

12.5 cm., broŝ. 3 ŝil. 6p.

Ni salutas kun ĝojo la aperon de ĉi tiu nova aldono al la vico de jam aperintaj tradukoj de Shakespeare; des pli en la ĝenerale bonega traduko de S. A. Andrew kaj la perfektaj antaŭzorgoj de la fama eldonejo (entute nur du preseraroj, bela aspekto, kaj tiu ŝatinda impresado de *normaleco* kontraste al multaj eldonoj amatoraj aŭ propagandaj).

La porĉiama viva tipo de Sir John Falstaff, aperinta en la du partoj de la dramo *Henriko V*, kunigas en si mem la plej amuzajn malvirtojn—kruciĝon de *Miles Gloriosus* el Plaŭtus kaj *Panurge* el Rabelais; kaj malgraŭ liaj emoj, oni ne povas sin defendi de ia simpatio al lia memfiera, dika figuro. Eĉ kiam, en la humorplenaj scenoj de *Gajaj Edzinoj de Windsor* li malaltiĝas (ĉu pro deziro de reĝino Elizabeth, kiel oni rakontas?) ĝis rolo de amindumanta maljuneta fripono, li altiras al si favoran, amuzan atenton de la leganto.

Ni ne rakontu la konatan historion de Falstaff. Al ĝi mallaŭte agordiĝas, kvazaŭ pli delikata melodio, la historio de ĝentila Anne Page kaj de ŝiaj tri svatantoj. La tuton sekvas precize la traduko de S. A. Andrew, kiun mi tamen preferas en la lastaj aktoj ol en la unuaj. Se mi devus, pro recenzista devo, indiki ion plibonigeblan, mi konsilus pri stilo la eviton de tro fidelaj vortotradukoj (*firuzo, malsobremaj, tirano, rabistarejo* kaj la malbone elparolebla *batgratstrios* p. 42) kiuj ja bildigas laŭmodele la vortojn uzitajn de Shakespeare, sed malhelpas tujan kompreneblecon.

Cetere la verko estas rekomendinda kaj ĝia graveco notinda. Ĉu mi risku konsili la eldonon de ĉiuj nun aperintaj tradukoj el Shakespeare en pli luksa vesto por formi kolekton, kiu estus valorega donaco, belaspekta kaj agrabla?

C. Conterno.

**Kongresa libro**, Germana Esperanto-Kongreso, Göttingen, 1949. 62 kaj 34 paĝoj, 21 × 15 cm. Eldonita de la Loka Kongreso Komitato. Ilustrita. Prezo ne montrita.

Per ĉi tiu kongresa libro la germanaj Esperantistoj reprenas malnovan tradicion, aperigi ĉiujare tian dokumentaron kun la siatempa subtitolo: *Das Esperanto ein Kulturfaktor*. La nuna libro estas raporto pri la agado de ĉiuj

organizaĵoj en postmilita Germanujo. Aro da bildoj de la ĉefaj agantoj, kaj je la fino de la libro vidaĵoj de la urbo Göttingen. Atentinda averto je la fino de la libro: "La sola lingvo uzota okaze de la kongreso estas Esperanto. Ni ne volas aŭdi naciajn lingvojn dum la kongresa semajno."

H.J.

**Ricevitaj: Karta Enciklopedio**: Serio el 8 kartoĵoj ilustritaj, modelo de konstruota karta enciklopedio. Temoj: kultur-historiaj, popularsciencaj, lingvaj k.s. Eldonis G. Marin, La Bosketo, Whiteway, Nr. Stroud, Glos., Anglujo. Prezo 4 rpk. aŭ 1ŝ. 3p.

**Floroj**: serio el ses belaj fotoj de floroj, poŝtkartformataj. Eld. Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstr. 7, München-Pasing, Germanujo. Prezo por serio: 1.20 gm. aŭ 4 rpk.

**Fascicule N-ro 8**: Feuillet Encyclopédique de Documentation Espérantiste. Daŭrigo de la konata enciklopedio de L. Perret, 106 Cours Dr-Long, Lyon, Francujo.

**Zak-Woordenboekje F. L. E.** Poŝvortaro nederlanda-Esperanta Esperanta-nederlanda 83 p. broŝ. Eld. Libroservo de F. L. E. Roelantstr. 4, Amsterdam W., Nederlando. Prezo 0.50f.

**Festschrift** zur Briefmarken-Ausstellung, manlibreto de filatela ekspozicio en Rendsburg, Germanujo. Enhavas artikolon en Esperanto.

**O zkouškách z esperanta.** Všeobecné poučení a syllabus otázek. Připavila zkušební komise. Zredigovali: Dr. Stan Kamaryt a Dr. Tomáš Pumpr. (Pri ekzamenoj pri Esperanto. Ĝeneralaj informoj kaj listo de demandoj. Preparis Ekzamena komisiono. Redaktis D-ro Stan. Kamaryt kaj D-ro T. Pumpr).

Broŝuro donanta klarigojn pri ekzamenoj en Ĉeĥoslovakujo, kun celo helpi al kandidatoj. Listo de temoj el la gramatiko, sintakso kaj stilistiko, el la teorio de internacia lingvo, historio kaj organizo de la movado, literaturo.

MIRO, organo de Magia Internacia Rondo, interesa faka gazeto ciklostilita. S. W. Ahlm, Pontonjergatan 33-V, Stockholm, Svedujo. BOLETIN, N-ro 1, organo de Federacion Esperantista Espanola, Ruzafa 7, Valencia, Hispanujo. PRAHA, ilustrita faldprospekto eldonita de Fremdultrafika Unio, Praha 1, Ĉeĥoslovakujo.

**Eskimoj, Fajrolandanoj kaj Buŝmanoj**, de J. F. C. M. Dercks. Ciklostila 12-paĝa kajero kun interesa enhavo. Prezo 3ŝil. 9p. Mendu ĉe Esperanto Film-Grupo, BERGEN-OP-ZOOM, Nederlando. Pagu al U.E.A.

Nia felietono :

## KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

F. Omelka

### VII. La decido de Payen

Vespero venis sur la glaciroko. Jam la trian vesperon, kiun travivis la malfeliĉuloj kiel kaptitoj de la montegaro.

Ĝi estis trankvila sed senkonsola. Neniu en la aeroplano inklinis paroli. La sciigo de Generalo Gibson, kies veron la radiisto facile atestis, kreis humoron paralelan nur al la grado de frosto.

Centoj kaj centoj da novaj pensoj naskiĝis en la kapoj de la trafrostiĝintaj malfeliĉuloj. Eble oni sendos aviadilojn traserĉi la tutajn Alpoj, sen atento pri la ricevita komuniko? Eble atingos la glacirokon iuj montgrimpuloj, persistemaj kaj harditaj alpistoj? Ke ĉie estas amasegoj de la falinta neĝo, la bravaj homoj ne timas! Ju pli granda la danĝero, des pli kuraĝe ili volas venki! Eble . . .

Sed ĉi tiuj pensoj naskiĝis nur pro tio, ke ili sentis, ke en la sekvontaj minutoj ili mortos. Neniu ja fosis la tombon por ili memvole kaj laŭte. Sed apenaŭ ili per nova ideo ekĝojis, varmiĝis, tuj ili komencis ĝin senvorte analizi. Ili estis al si reciproke plenaj de respekto kaj atento, precipe la sanaj al la malsanaj. Ili ne volis vundi unu la alian. Ili ne volis inciti la vundojn kaj starigi antaŭ la okulojn la abomenan spegulon de la realo. Almenaŭ la ceteraj kredis, ke tiu aŭ alia revo estas realigebla . . .

Kaj ĉar ĉiuj pensis same, regis tie humoro kiel post enterigo.

Krome komencis turmenti ilin malsato. S-ino Gibson disdonis kun la lastaj porcioj la kuraĝigajn ridetojn. Ŝi ja sciis, ke tio estis la sola, pri kio ŝi ne estis devigata ŝpari. *Feran provizon* ŝi lasis por la morgaŭo. Kaj poste . . . ?

La vunditoj kondukis tre brave. La vundoj ja doloris, pikis, jukis, sed neniu plendis. Kiam la posttagmeza suno komencis varmegi, oni elportis la patientojn eksteren. Kaj denove estis la brava kaj senlaca S-ino Gibson, kiu kontrolis la transportadon de ĉiu vundito kaj zorgeme atentis, ke la vundo per la moviĝo ne suferu, ke la portantoj en la mallarĝa pordeto ne tuŝu ion. Dum ĉi tiuj kelkaj tagoj ŝi fariĝis por ili patrino.

La stevardino ĉiel helpis ŝin, sed malgraŭ tio, ke ŝi estis komplezema, la malsanuloj turnis sin kun siaj suferoj al S-ino Gibson.

“Mi nenion valoras ĉi tie”, koleretis la juna knabino, kiam ŝi denove volis servi unu patienton kaj tiu vokis S-inon Gibson

“Ne koleru, fraŭlino,” li kvietigis ŝin. “Aĵ mi ŝajnas, ke anstataŭ S-ino Gibson, flegas min mia panjo.”

“Nu, mi scias . . . sed mi tiom volas helpi ŝin. Ŝi ja tion . . .”

Ŝi volis diri “ne eltenos” sed subite ŝi silentis. Kial rememorigi la malsanulojn, ke S-ino Gibson proksimiĝas al la fino?

“Ne estu tiom modesta, fraŭlino,” trankviligis ŝin la sinjoro. “Vi helpas min super viaj fortoj. Mi ne scias, kion mi farus ĉi tie sen vi.”

Malfrue vespere ili endormiĝis.

Ĉu ili dormis? Ili apenaŭ fermis okulojn, kiam ili sonĝe vidis aeroplanon, kiu zorge malsuprenleviĝas al la glaciroko. Piloto salutas ilin kaj postulas de ili signon, kie li povas plej bone alteriĝi. Ili elkuras sur la glacion, montras, svingas, ĉirkaŭbrakas unu la alian, aplaudas, ridas, ploras, saltetas kiel malgrandaj infanoj . . . En tiu momento puŝo de malmola apogilo, akra doloro en la piedo aŭ en la mano, malfermitaj okuloj, mallumo, maltrankvila spirado de la kunsuferantoj . . . kaj tie antaŭe, klinita apud tremanta flamo de estingiĝanta kandelo super malfermita libro, sidas S-ino Gibson, kiu demandas per mallaŭta voĉo:

“Ĉu vi deziras ion?”

“Ne, mi dankas, S-ino Gibson. Mi fartas bone.”

Poste tio estis ia sava ekspedicio. Ĝi alveturegas sur skioj kiel aro de fantomoj. Ĝi kunportas nutraĵojn, varman lakton, varmegan teon, dikajn lanajn kovrilojn, komfortajn portilojn. Ili veturas de sur la glaciroko, returnas sin por lastan fojon vidi la lokon, kiu facile povus fariĝi tombo, kaj oni jam rapidegas malsupren en la valon, renkonten al la homoj, renkonten al nova vivo . . . Subite la glaciroko malmilde kliniĝas, la portilo sur la skioj ekveturas, la savantoj vane klopodas reteni ĝin . . . oni falegas ĉiam pli rapide, pli plenforte, pli sovaĝe . . . antaŭe troviĝas terura abismo kun nevidebla fundo . . . angorplena krio . . . mortiga falo . . .

Mallumo kaj S-ino Gibson.

“Ĉu al vi doloras?”

“Nenio, S-ino Gibson . . .”

Kaj poste la situacio estas alia. Bakker sidas en la rondo de sia familio. Vespermanĝo estas

finita. En la forno agrable krakas la brulligno. Ekstere fajfas la ventego kaj li rakontas. La familio estas kvazaŭ en ekstazo. Ankaŭ la konatoj venis por rigardi lin. Ili premas lian manon kaj ne povas kredi, ke li vere revenis. Scivolaj demandoj. Kiam tio okazis? Kiom da personoj flugis? Kiu trovis vin? Kiel vi malsupreniris? Kio okazis al la ceteraj? Bakker ridetas; li havas ĝojon pro tiu intereso kaj nur nun li konstatas, ke li travivis ion eksterordinaran. Li faras gravan mienon kaj rakontas per sia kutima humoro, gaje kaj simple, ĉion kiel heroo en kortuŝa tragedio. Li finas. Familianoj kaj amikoj ĉirkaŭbrakas lin. Ili ĵetas lin alten pro la ĝojo, ke li estas savita, poste ili balancigas lin iom pli, Bakker flugas alten, puŝego kontraŭ la plafonon—aŭ!—

“Ĉu vi batis vin?” karesas lin la silka voĉo de sinjorino Gibson. “Momenton, mi ordigos al vi la kusenon.”—

Payen alteriĝas en Parizo.

Ĉe la elirejo el la flugejo staras policisto. Li observas la vojaĝantojn kaj kaŝe komparas ilin kun la fotografaĵo, kiun li havas en la maldekstra manplato. “Ĉu sinjoro Payen?” li demandas.—“Jes.”—“Mi arestas vin en la nomo de la leĝo.”—“Pardonu . . . tio estas miskompreno.”—“La miskompreno ne estas ebla.”—“Sed—kial?”—“Tion vi ekscios ĉe la juĝistaro. Cetere, tion ja scias la tuta Francujo . . . kial mi ne diru tion al vi? Daŭmal estis kondamnita al la morto. Li estis ekzekutita hieraŭ. Antaŭ sia morto li konfesis ĉion: li vendis siajn planojn al la Germanoj kaj vi helpis lin.”—“Permesu . . . !”—“Kiaj paroloj! Ni iru!”—Li paŝas flanke de la policisto kaj ekkrioj de gazetvendisto penetras en liajn orelojn: “*Paris Soir! Paris Soir!* Ankoraŭ unu fakturo pagita! La perfidulo Daŭmal ekzekutita, pri lia kunulo Payen eldonita la arestordono! *Paris Soir! Paris Soir . . . !*” La bubo krias el la tuta gorĝo, kvazaŭ oni minacas lin per tranĉiloj. Payen ŝtopas siajn orelojn, sed la voĉo estas ĉiam pli akra, pli tondra, el la vortoj “perfidulo” kaj “Payen” fariĝas la ardiĝintaj ŝtaldratoj, kiuj pikas la oreltimpanojn, la bruado en la kapo ŝanĝiĝas al la fulmotondro, Payen ŝanceliras, altaj domoj ŝancelegiĝas, poste ia krako kaj terura, surdiga frapego—

Payen elsaltis.

Samtempe kun li ekstaris ĉiuj sanuloj. La pacientoj, kiuj povis, levis sin sur siaj kuŝejoj. Malfermegitaj okuloj estis direktataj al sinjorino Gibson.

“Kio okazis?”

“Mi ne scias,” ŝi respondis necerte.

“Lavango!” opiniis Bakker.

“Mi konas la bruadon de la lavangoj,” neis per la kapo sinjorino Gibson. “Ĝi estus ja pli longa, ni aŭdus ĝin ankoraŭ nun. Tio estis frapego. Nur la frapego, nenio plu.”

“Silentu!” vokis vundita civilulo. “Ĉu ne ĉirkaŭflugas super ni iu aviadilo? Eble ili pafis por atentigi nin, ke ni devas doni signon al ili, kie ni estas?”

Payen kaj la stevardino eliris el la aeroplano kaj atente aŭskultis.

Silento.

“Kio ĝi povis esti?” demandis denove la maltrankviligitaj pasaĝeroj.

“Se tio ne estis lavango—kaj tio ne estis—” diris malrapide Generalo Gibson, “tio povis esti nur—”

En tiu momento rigardis lin sinjorino Gibson. Ĝi estis nur mallonga, fulma rigardo—sed kiom signifas tia rigardo ĉe homoj, kiuj vivis kune preskaŭ kvardek jarojn! Kiom ĝi povas sciigi!

Generalo Gibson ekkomprenis. Li silentis kaj rapide ordetigis la bandaĝon sur la vundita nazo.

“Kio do povus ĝi esti?” instigis lin ĉiuj.

“Nu . . . ,” li ne povis tuj elemparasiĝi. “Tio povus esti nur fantomo . . .”

“Neeble! Ni ja ĉiuj estis per tio vekitaj.”

“Kompreneble . . . ankaŭ mi ne kredas nuran fantomon. Sufiĉus ekzemple, ke pro la frosto kraku iu muro de la aeroplano. Malforta frapo ĉi tie bruas kiel tondro, precipe se homo dormas.”

“Sed sinjorino Gibson maldormis!”

“Mi iomete dormetis, amikoj. Mi opinias, ke ni ĉiuj faris la saman.”

Ankoraŭ longe ili parolis pri la stranga okazintaĵo. Nur preskaŭ je mateno ili denove endormiĝis.

Generalo Gibson kaj lia edzino iris dum kelkaj momentoj eksteren. Ili foriris kelkajn paŝojn de la aviadilo.

“Ĉu vi opinias, ke ĝi estis la glaciroko?” demandis Generalo Gibson.

“Mi scias tion. Mi maldormis.”

“Ĉu nia glaciroko?”

“Jes. La tuta aeroplano ektremis.”

“Tio ja estus tre malbona . . .”

“Pro tio mi avertis vin.”

“Dankon. Mi volas ĉion solvi tuj, soldatmaniere, kaj mi forgesas, ke ĉi tie . . .”

“Estos pli bone, se ni pri tio silentos. Egale ni povas nenion fari kontraŭ tio.

“Bedaŭrinde.”

La frosto tremigis ilin. Ili reiris.

Sed ankoraŭ unu homo sciis, ke ĝi estis la glaciroko. Marcel Payen. Kiel studento li vizitis kelkfoje en kristnaskaj libertagoj Savoj-Alpojn por montgrimpi. Li konis tiun strangan krakon, kiu sonas kiel kanonpafo. Krom tio li vidis la avertan rigardon de sinjorino Gibson, post kiu la Generalo tuj silentis.

Matene, kiam iomete plivarmiĝis, li iris promeni. Sola. Atente li observis la glacirokon, sed li nenion trovis. Fine li atingis la okcidentan randon de la glaciroko, kie malegale ondigitaj neĝblovaĵoj malebligis la antaŭenrigardon.

Li supreniris al unu el la plej altaj pintoj kaj staris kvazaŭ frostigita. Antaŭ li etendiĝis laŭlonge de la glaciroko profunda kreaĵo.

Li staris kiel ensorĉita.

“Kion vi diras pri tio, sinjoro Payen?” aŭdiĝis malantaŭ li.

Al la plialta loko proksimiĝis sinjorino Gibson. De la loko, kie ŝi ĵus troviĝis, ŝi ankoraŭ ne povis vidi la kreaĵon.

“Pri kio, sinjorino Gibson?” li faris nekomprenan mienon kaj rapide malsupreniris, por delogi ŝian atenton.

“Nu, pri tiu truo! Restu tie!”

La rigardo de Payen estis plena de admiro. Kiom da braveco montris ĉi tiu edzino de la Generalo!

“Ĉu vi sciis pri tio?”

“Kompreneble, tuj hieraŭ. Mi vidis ĝin posttagmeze, kiam mi iris dum kelkaj momentoj por spiri.”

“Kaj vi diris pri tio al neniu!” La frazo enhavis riproĉon kaj ankaŭ rekonon.

“Estus ja sence atentiĝi pri la danĝero, kontraŭ kiu ni povas nenion fari. Ho—!”

Ŝi supreniris la pinton kaj vidis la truon.

“Tion mi timis,” ŝi diris pene. Ŝia kutime trankvila vizaĝo montris ŝian malserenon. “La truo plilongiĝis certe kvindek metrojn. Kiel vi vidas, ĝi estas rekta kiel ŝnuro. Kaj ĝi celas rekte al la aeroplano.”

“Tio signifas—”

“Tio signifas, ke sufiĉas nur kelkaj tiaj frapoj, kian ni aŭdis nokte—kaj ni devos translokiĝi sur la glacirokon. Movi la enborintan aeroplanon, pri tio ni ne povas eĉ pensi. Kaj eĉ se ni sukcesus movi ĝin, kiu garantius al ni, ke la fendo ne turniĝos ĝuste al tiu loko, kien ni translokus la aeroplanon?”

Ili observis senvorte la minacan cikatron de la glaciroko.

“Antaŭ la malsanuloj mi ne parolos pri la afero, sinjoro Payen,” komencis post momento sinjorino

Gibson. “Sed al vi mi tion diros: nia situacio estas senespera. Temas ne nur pri la truo. Minacas ankaŭ la malsato. La hieraŭa deserto, kiun mi disdonis, ja estis nenia manĝaĵo. Por hodiaŭ ni havas nur po unu biskvito kaj peceto da ĉokolado, sed nur por la pacientoj. Ni, sanaj, devos ankoraŭ resti sen manĝaĵo.”

“Ni devas esperi,” li provis konsoli ŝin.

Ŝi ridetis. Sed ĝi estis alia rideto ol tiu, kiun kutimis vidi la malsanuloj.

“Esperi? Mi ankaŭ esperis. Sed en tiu momento, en kiu mi eksciis, ke la mondo ne scias la lokon de nia alteriĝo, mi perdis la esperon. Ne temas pri ni. Ni eĉ sen manĝaĵoj povus elteni tri, eble kvar tagojn. Kompreneble, se ni estus devigataj forlasi la aeroplanon, dumnokte ni certe frostiĝus. Sed temas pri la vunditoj

“Tiujn vi flegis tiom zorge, ke vi ne bezonas timi.”

“La flegado ne sufiĉas. Ili bezonas kuracilojn. Mi timas, sinjoro Payen,” ŝia voĉo rompiĝis, “mi ege timas . . .”

“Ĉio estos denove bona,” li konsolis ŝin.

“Do mi diros tion al vi malkaŝe . . .” ŝi decidiĝis subite. “Mi jam ne povas sole porti tiun respondecon. Du rompaĵoj komencas kunpusiĝi. La piloto tute ne plaĉas al mi. Li estas heroo, li eĉ ne ĝemetas—sed tio min ne trompas. Kaj mia edzo—”

“Kio estas al la sinjoro Generalo?”

“Li estis ĉiam tiel malmola,” ŝi flustris. “Komprenu, malmola al si. Ankaŭ ĉifoje li ne permesis, ke mi zorgu pri lia vundo tiom, kiom ĝi meritis. Ĉiam, li diras ke tio estas nenio—”

“Li ja diras, ke la vundo bele resaniĝas.”

“Resaniĝas, resaniĝas . . . Ankaŭ al mi li tion diras, malfeliĉulo. Kaj dume — li ricevis la sangveneniĝon.”

“Ho—!”

“Se tiuj plej gravaj pacientoj ne ricevos helpon de la kuracisto en kvardek ok horoj, ili estos perditaj.”

Payen senvole pugnigis la manojn. Kvazaŭ li volus kontraŭ iun ĵeti sin kaj lukti kun li. Kiom hontige, humilige, malinde al sana viro ĝi estas! Senpove rigardi, kiel la maljuna virino heroe batalas kontraŭ la malsanoj kaj kontraŭ la proksimiĝanta morto! Vidi, kiel la homoj pereas, kaj ne povi eĉ fingron movi pro ili! Scii, ke ie en la malproksimo estas fidela kamarado, kiu angorplene kalkulas la horojn, kiuj mezuras la distancon inter li kaj la eldiro de la verdikto! Laŭ *Paris Soir* oni povis facile diveni, kio Daumalon atendas. Kaj neniel mirigas, ĉar pri la perfiduloj kaj koruptuloj oni devas vere severe

agi. Daŭmal—kaj perfidulo ! Kaj sufiĉus kelkaj vortoj, kelkaj vortoj de Payen . . . .

La montegaro kunpremis lin per glacia roko, de kiu li neniel povis foriĝi.

Jes, batali, lukti, interbatali kaj venki ! Eble ankaŭ malvenkita fali, nur ne tiel malfare—

Naiva homo ! Batali, lukti, interbatali ! Nu, interbatalu, stultulo, interbatulu, se vi havas kontraŭulon ! La kontraŭulo estas ja nur glaciroko—

Se necese, ankaŭ kun la glaciroko !

“Ĉe la frakasigo ni havis feliĉon,” finis siajn pensojn sinjorino Gibson. “Sed ni saviĝis nur por ke ni nun . . . mortu. Se ne okazos miraklo, ĉio estos finita.”

Se necese, ankaŭ kun la glaciroko ! Subita deo, aŭdaca, kuraĝa . . .

“Ne estos, sinjorino Gibson !” li vokis memkonfide. “Ni faros ĉion, por savi niajn kunulojn !”

Ŝi rigardis lin malkomprene.

“Kaj ĉu ni ankoraŭ ne faris ?”

“Vi faris ĉion, pardonu,” li senkulpigis ŝin. “Sed ni, nome mi, ankoraŭ ne.”

“Kion vi povus fari, sinjoro Payen,” ŝi diris malĝoje. “Mi opinias, ke al ni restas jam nenio.”

“Ankoraŭ io,” diris firme Payen.

“Mi ne komprenas.”

“Al ni restas la lasta.”

“Tio estas ?”

“Provi la malsupreniron en la valon.”

(*daŭrigota*)

### Malgrandega Kompost-maŝino

Ekzistas scienca aparato ne multe konata. Precipe ĝi devus esti konata de verkistoj kaj teknikistoj.

Ĝi estas unueca maŝineto, certe unua-vide aspektanta kiel skribmaŝino, sed estas elektra komposta maŝino funkciigebla kiel la grandaj maŝinoj en presejoj. Literoj ne necese devus simili tiujn de ordinara skribmaŝino kaj laŭvole povas esti nedistingeblaj de presliteroj. Literoj italaj kaj de ĉiuj mezuroj uziĝas ; eĉ ligitaj literoj estas haveblaj, kiujn ordinara leganto ne rimarkas ĉar legadi ilin estas tiel facila. Estas 600 specoj kaj mezuroj taŭgaj por ĉia celo : granda por supro de paĝo aŭ reklamoj ; iuj dikaj kaj neornamaj.

Por bilanc-kontistoj, restoraciistoj, hotelistoj, kolegiestroj, rapid-presistoj, legistoj, kaj preĝejaj sekretarioj, ĝi estas preter-taksebla, ĉar per kroma rubando ĝi ebligas rapidan tuj haveblan rezulton.

Unu firmo asertas, ke ĉiun jaron ili ŝparis ĝian koston. Tiaj kopioj neniel similas al hektografajoj.

Kiel estas, ke tia maŝineto havas tiajn kapablojn, tamen estas portebla unumane, aspektanta kiel ordinara valizo ?

La kaŭzo estas ke la literoj estas sur kurbita literplato kiu cirkulas cirklan amboson, kiu havas du tiajn tuj ŝanĝeblajn. Efektive ekzistas pli ol 300, en ĉiuj lingvoj, eĉ en araba kaj ĉina. Unu literplato restas proksima al la uzanto, portanta ekzemple italajn literojn aŭ tradukon. Per nur turno de centra najlego oni povas anstataŭigi per ĝi la jam uzitan platon. Mia maŝino havas kapablon de 1,080 literoj, signoj, k.c., ĉar mi havas 12 da tiaj literplatoj. En verko *Egiptaj Hieroglifoj*, mi uzas italajn literojn por tiu lingvo, sed rektajn por la instrua parto de la verko.

Por klarigi la prononcon, la sola rimedo estis vortoj en lingvoj de legantoj : vortoj kiuj havas la vokalojn kiuj mankas en la pure konsonante skribitaj papirusoj kaj gravure skulptitaj aĵoj de antikva Egiptujo. Mi sukcesis maŝinskribi vortojn de 19 lingvoj kiuj havas ekvivalentajn vokalojn ; sed ĉefe per la pripronca helpo de rifuĝantoj en Anglujo dum la milito. Ekzistas varioj de eĉ ĉiu skribita vokalo, egale nuntempe kiel en hieroglifoj.

Eble vi demandus kiel oni nomas tiun maŝinon ? Tre konvene ĝi nomiĝas ‘Vari-typer’.

Sed estas manko kiu tuŝas nin Esperantistojn : ne ekzistas konvena Esperanta literplato. Mi pretigis unu, forĵetinte de malnova plataĉo ne-Esperantajn literojn q, v, w kaj x, uzis ties lokojn por literoj ĉ, ŝ, ŭ, kaj ^ alta por ĉef-literoj. Literon ŭ mi metis proksime al a kie ĝi plej ofte estas uzata.

Mi sendis mian planon al la fabrikintoj, petante reformitan liter-platon indan de Esperanto, kaj ili afable respondis, ke fari ĉiun novan platon kostas mil da dolaroj kaj iaokaze ne estus farebla antaŭ 12 monatoj.

Nu, Esperantistoj ! movu vin kontraŭ tia malestimo pri nia lingvo. Esperanto eĉ listiĝas en speciala listo “Fremdaj Lingvoj” ! Fremda al kiu ? Ĝi estas ĉies,—lingvo universala, kaj nur fremda al neprogresemaĵoj. “Ne-Angla” estus pli bona titolo. Iu povus diri “Sed mi ne maŝine skribas”. Kiel Esperantisto inda je la nomo, li aŭ ŝi devus esti lojala al ni kaj nia solidareco, kaj ni staru ŝultro-al-ŝultro por nia mondprogresiva movado. Skribu amase al Coxhead Corporation, 333 Avenue of the Americas, New York 14, U.S.A., kaj niaj unuigitaj penoj sukcesu kaj helpu al Mondpaco per niaj detalaj agoj.

A. J. Howard Hulme

### Stranga esploro

En Londono loĝas sinjoro—iu S-ro Richmond—desegnisto de sciencaj instrumentoj, kiu havas la plej strangan okupon. Li provas per la volo influi la agojn de mikroboj! Vespere, post la ĉiutaga laboro, ĉi tiu 27-jara homo sidas ĉe sia mikroskopo kaj observadas la etajn mikrobojn troviĝantajn en akvo. Li centrigas unu mikrobon en unu el la kvadratoj de la mikroskopo kaj sur ĝi koncentras la tutan intenson de sia volo, kun la intenco devigi ĝin naĝi laŭ difinita—sugestiita—direkto.

Tio ne estas telepatio, laŭ la akceptita senco de la vorto, ĉar la mikrobo ne havas cerbon per kiu ricevi la pensojn, pensvibrojn, nomu ilin kiel ajn. La aferon oni nomas Angle *psychokinesis*—fabrikita vorto kun signifo *direkto de psika influo*.

S-ro Richmond ĉiufoje koncentras sian rigardon sur la mikrobo dum precize 15 sekundoj volante, ke ĝi movu sin laŭ dezirata direkto. Post tiu tempo li registras la pozicion de la mikrobo (li tion kontrolas per la kvadratoj de la kliŝo) kaj tiam komencas novan provon. El 1495 provoj li povis registri 927 sukcesojn, kaj tio estas pli alta procento ol nura hazardo.

Pro tiuj sukcesoj la eksperimentisto faras aranĝojn pri filmado kaj mem konstruas delikatan kaj komplikan aparaton, elektro-kameron, por doni al la eksperimentoj konkretan kaj objektivan bazon.

Richmond jam konstatis, ke sukceso estas pli granda, kiam li estas freŝa, kaj ke la provoj dum laco ne estas tiom kontentigaj—tre signifa fakto!

La celo de Richmond estas, malkovri la rilaton inter la volo kaj la materio. Ke ja ekzistas la rilato evidentigas multaj kaj konataj fizikaj reagoj post imagostimulo. Ekzemple, la deziro vomu post iaj aludoj estas konata fenomeno. Biologoj kaj psikologoj jam multe esploris la fenomenon, ke homa organismo daŭre funkcias eĉ kiam la individuo dormas aŭ estas senkonscia. Oni ĝenerale asertas, ke la cirkulo de la sango, la spirado, la digestado kaj la multaj similaj funkcioj, estas reguligitaj de la “subkonscia volo”; t.e. la individuo mem ne konscie kaj ne per ia peno de li konata, direktas la normalan funkcion de siaj organoj. La psikologio instruas, ke la *subkonscio* (mi uzas kursivojn ĉar por tiu objekto ekzistas diversaj nomoj laŭ diversaj skoloj) estas influebla nur per sugestioj. Tio estas la bazo de la sistemo de la Franco Coué, kiu en la intermilita periodo sin famigis (aŭ ridindigis . . . depende de la skolo juĝanta!) per la kliŝaĵo *Ĉiutage kaj ĉiumaniere mi pli kaj pli bonstatas*, kiun homo ripetu al si konstante.

Neniu volus kontraŭdiri, ke tre multaj *miraklaj* resaniĝoj fakte havas sian originon en tiu vere eksterordinara povo de la homa volo reguligi la

fizikan organismon. Tamen ĝis nun multo restas neklara, aŭ estas implikita kun diversaj kredoj, skoloj, mistikismoj kaj sektoj tiel, ke objektiva prijuĝo apenaŭ estas ebla.

Se sukceso daŭre kronos la penojn de S-ro Richmond li intencas pliampleksigi la eksperimentojn ĝis aliaj vivoformoj; sed, kontraŭe al eble ĝenerala supozo, li elektos ne pli grandajn estaĵojn, sed *pli malgrandajn!* Li ja celas malkovri, ĉu eventuale oni povos raciigi la procedon de sanigo en la homa korpo per konscia sugestiado al la subkonscio, kiu siavice reguligos la agojn de la bakterioj kaj baciloj, kiuj havas lokon en la homa korpo, precipe en la sango, kaj kiuj ludas gravegan rolon en nia bon- aŭ malbonstato. Tio malfermas vastegan perspektivon por la biologo . . . .

M.S.

### Raporto el Germanujo

Forpasis jaro post la monreformo je la 20-a de Junio 1948; tamen okazis granda transformiĝo ĉi tie. Mi loĝas en la grandparte detruita ĉefurbo de Niedersachsen, en Hannover, ofte nomita la *duonmilionurbo en la verdaĵo*, kaj mi miras ĉiutage denove. Preskaŭ ĉiuj objektoj, kiuj antaŭe mankis, nun estas riceveblaj en la vendejoj. Sufiĉe da mizero tamen ekzistas. La vivkondiĉoj iomete pliboniĝis rilate al nutraĵoj, vestoj, loĝejoj, sed pli kaj pli da homoj estas senlaboraj kaj mono ĝenerale mankas.

Novaj vendejoj, filmteatroj, hoteloj kaj aliaj konstruaĵoj kreskis kaj kreskas kiel fungoj. Nova vivo ekestas apud la militruinoj. Tio estas pripensinda bildo por ĉiuj, kiuj volas vidi kaj ankaŭ agi laŭ la senco de la malnova proverbo: *Paco nutras, milito konsumas*.

A. Schorcht.

### ESPERANTISTA VIVO

#### Distingo

**S-ro F. O. Bevan**, membro de UEA en Farnborough, Anglujo, elektiĝis prezidanto de la Asocio de oficistaroj de lernejoj por Junaj Deliktuloj. En lia parolado prezidanta li citis el presajoj al li senditaj de Esperantistaj korespondantoj.

#### Niaj mortintoj

Ni sciiĝis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

**Barlow.** John Barlow, membro de UEA en Bolton, Anglujo, forpasis la 14-an de Marto 1949.

**Froding.** Karl Froding, delegito de UEA en New Auburn, Wis., Usono, forpasis la 26-an de Aprilo 1949, 63-jaraĝa. De sveda deveno, esperantisto de 1903, li multe laboris kaj eldonis diversajn Esp.-gazetojn, inter ili “Scienca Gazeto” (1933–1940).

**Jukl.** S-ro Valdo Jukl, profesoro ĉe la Komerca Akademio en Bratislava, forpasis 30–4–1949, 58 jaraĝa. La morto de ĉi tiu modele laborinta samideano estas grava perdo por la ĉeĥoslovaka movado.

**Ödegard.** S-ro Werner Ödegard, ĉefredaktoro, delegito de UEA en Hudiksvall, Svedujo, estrarano de T.E.J.A., forpasis en Aprilo, 1949, 60 jaraĝa.



## ENIGMA KONKURSO N-ro 40


Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

**Solvoj de la enigmoj el la konkurso N-ro 38.**

**N-ro 81 :** 1. porcio ; 2. pagodo ; 3. dogano ; 4. rozeto ; 5. topazo ; 6. gazeta ; 7. tirana ; 8. bezoni ; 9. betona ; 10. rezona ; 11. retino ; 12. kuniri ; 13. bizona ; 14. banano ; 15. barako ; 16. rekonu ; 17. kolono ; 18. bokalo ; 19. kokete.

**N-ro 82 :** 1. lango-sango ; 2. rato-kato ; 3. sardelo-kardelo ; 4. vesto-besto ; 5. murdo-gurdo-turdo-burdo. (kelkaj solvintoj faris la rimarkon, ke sardelo ne plu naĝas. Ili pravas).

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 36-a konkurso : S-ro G. Rust (Brit.) 107p ; S-ro V. Marcone (Ital.) 101p ; F-ino J. Dedieu (Franc.) 98p.



**Enigmo N-ro 85 :** Sesangulo : Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita sesanguleto devas enhavi unu literon. Tiuj ses literoj formas vorton. La sagetoj montras la fakon, kie komenciĝas iu vorto, kaj la direkton en kiu oni legu ĝin. La signifoj de la 19 vortoj estas : 1. saltinsekto ; 2. gento de simioj ; 3. parto de tagmanĝo ; 4. ŝuldo ; 5. vegetaĵo, rimarkinda pro tre larĝaj kaj elegante dentrandaj folioj ; 6. preĝejo ; 7. manĝilo ; 8. malhelpas la navigacion ; 9. ebligas la akcepton de radioelsendo ; 10. ripozejo ; 11. ekstera malalta ŝtuparo, finiĝanta per plataĵo, sur kiu malfermiĝas pordo de domo ; 12. malagrabla sento ; 13. unua aviadilo ; 14. edeno por ratoj ; 15. sankta libro ; 16. unuarangulo de eklezia distrikto ; 17. enĉambra litniĉo ; 18. franca arkitektura stilo ; 19. legomo.

Ensendis S-ro A. H. v.d. Broek (Ned.). Kiam pasintfoje mi demandis pri ensendo de nova kaj taŭga serio da vortoj mi forgesis aldoni, ke la sagetoj povas esti lokataj laŭ la trovitaj vortoj. Multaj jam komprenis tion kaj N-ro 85 estas la unua rezultato.

**Enigmo N-ro 86 :** Silab-enigmo : A - A - bli - bo - ci - cis - ĉo - dak - dar - de - di - di - di - do - e - e - en - ga - go - go - i - i - ka - ko - ku - la - lis - lo - lo - ma - me - mi - mi - mo - mo - na - nik - no - no - no - no - nun - o - o - o - o - o - o - os - pa - pi - pi - pla - plas - ran - rap - re - ro - ro - sar - si - si - so - so - so - stan - su - ta - tak - te - te - ti - ti - to - to - tra - tri - trom - vi - zo.

El la ĉi-supraj 81 silaboj faru 22 vortojn. La unuaj literoj, sekvataj de la kvaraj literoj, formas difinon.

Jen la klarigoj de la vortoj : 1. harmonio ; 2. arto reliefe reprodukti objektojn ; 3. povas esti flata kaj malflata ; 4. grava persono por "Esperanto" ; 5. konifera arbeto ; 6. delikata agato ; 7. legomo ; 8. preĝejo ; 9. muzikilo ; 10. veturilo ; 11. flago ; 12. aroma vegetaĵo ;

13. senvalora instrumento ; 14. valorpapero ; 15. planto uzata en medicino ; 16. subakvigi ; 17. preni en posedon ; 18. legosigno ; 19. juĝo de la antikvaj atenanaj ; 20. jam mortinta ĝi ofte faras grandan vojaĝon ; 21. magia ŝirmilo ; 22. muzikaĵo.

## ESPERANTO KAJ RADIO

*Mallongigoj :* I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

<b>Ĉiutage</b>	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 25.34m. I.
	18.15-18.30	Paris. 48.39m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
	19.00-19.15 21.00-21.15	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia. Praha. 31.41m. P.
<b>Dimanĉo</b>	23.30-23.35	Budapest Kossuth. 549.5m. I. Budapest VIII, Bródy Sándor u.7.
<b>Lundo</b>	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	11.30-11.40 15.15-15.30 23.30-23.35	PRG2 (Brazilo). 104m. P. Sveda Radio. 19.80m., 27.83m. Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
	<b>Mardo</b>	01.15-01.30 08.00-08.20 11.55-12.00 14.15-14.30 17.40-17.45 22.00-22.10
<b>Merkredo</b>	20.10-20.25 23.30-23.35	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8. Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
<b>Ĵaŭdo</b>	11.55-12.00 17.45-18.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat. Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 229.6m K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.40-17.45 22.00-22.10 22.00-22.15	Bern. Kiel marde. D-ro Privat. Ostrava. 259m. Graz 338.6m. I. (nur la unuan ĵaŭdon). Radio Graz, "Esperanto Voĉo" Zusertalgasse 14ĵa, Graz, Aŭstrujo.
	<b>Vendredo</b>	17.15-17.30 17.15-17.30 20.50-21.00 23.30-23.35

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 218

4-an de Junio 1949

## NOVAJ DELEGITOJ

## Argentino

**Buenos Aires.** FD (Homeopatio) : J. A. Quiña González,  
Str. Uruguay 714. Tel : 41-1081.

## Brazilo

**Porto Alegre.** FD (Filatelo) : B. C. Camozato, "Edificio  
Caiçara", Ap. 21. Tel : 9-1530.

## Britujo

**Birmingham.** D : F-ino A. Waite, 13 Vernon Road,  
Birmingham 6.

**Harpندن.** D : W. H. Coventry, 4 Douglas Road.  
FD (Komerco) : La D.

**Stafford.** D : E. Shaw, 25 Craddock Road, Holmcroft  
Estate.

## Finnlando

**Karjalohja.** D : Aarre Kunelius, Lehtola.

## Francujo

**Clermont-en-Argonne.** D : P. Denis, Clermont-en-Argonne  
(Meuse).

**Saint-Donat (Drôme).** D : M. Dupuy, Avenue Georges  
Bert. Tel : 68.

**Tourcoing.** VD : G. R. Gosseau, 77 Rue Cuvier.

## Jugoslavujo

**Mitrovica.** D : Dragutin Orlović, Sutjeská 9.

## Norvegujo

**Kristiansand S.** D : Ragnvald Horrisland, Mosby apud  
Kristiansand S. Tel : 6541.

## Nov-Zelando

**Pinehaven.** FD (Vegetarismo) : S-ino F. MacGill,  
Wyndham Road, Pinehaven, Heretaunga, Wellington.

## Svedujo

**Kristinehamn.** D : K. V. Johansson, Vahlundsvägen  
13 D.

**Trollhättan.** D : E. Lind, Dicksonsgatan 6 A. Tel : 13224.

## ŜANĜOJ

## Argentino

**Buenos Aires.** FD (Katolikismo) : vakas.  
**Marcos Juarez.** VD : nova adreso : Saenz Peña 981.

## Britujo

**Oxford.** FD (Bahaismo) : vakas.  
**Watford.** D kaj FD (Komerco) : vakas.

## Danlando

**Kolding.** FD (Junularo) : nova adreso : Haderslevvej 56.  
**København.** FD (Martinus instruado : Filozofio) : vakas.  
**Lyngby.** FD (Martinus Instruado) : M. Munch,  
Sjaellandsvej 28.

## Francujo

**Paris.** FD (Hebreaĵ aferoj) : vakas.

## Nederlando

**Den Haag.** FD (Muziko) : vakas.

## Nov-Zelando

**Trentham.** D : vakas.

## Portugalujo

**Leiria.** D : vakas.

## Usono

**Chicago.** D : nova adreso : 127 N. Dearborn St.,  
Chicago 2.

**Cranford.** D : vakas.

**New Auburn.** D : vakas.

**Phoenix.** D : nova adreso : route 2, Box 1437.

## MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

352. S-ino J. Fait, Gdansk, Pollando.  
326. S-ino M. Krausowa, Sosnowiec, Pollando.  
327. S-ino F. Jakob, Genève, Svislando.  
328. S-ino J. P. Blackstone, Orlovista, Fla., Usono.  
329. S-ro R. Blackstone, Orlovista, Fla., Usono.  
330. S-ro J. F. Clewe, Los Angeles, Cal., Usono.  
331. S-ro F. J. Kovarik, Chicago, Ill., Usono.  
332. F-ino E. C. Lippmann, Brooklyn, N.Y., Usono.  
333. S-ro W. Ewing, McMinnville, Ore., Usono.  
334. S-ro E. T. Lake, Brodheadsveille, Pa., Usono.  
335. S-ro Wen Chiching, Bangkok, Siamo.  
336. S-ro I. Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilo.

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de  
Majo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Majo 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	5067	6199
Individuaj membroj :		
MJ .. ..	755	667
MA .. ..	4034	3820
MS .. ..	312	335
Patronoj ..	21	15
DM .. ..	163	180
HM .. ..	55	57
	5340	5074
	10407	11273

**Grava.** Dum la kongresa periodo la oficejoj en  
Rickmansworth kaj Ĝenevo estos fermitaj. Oni bonvolu  
klopodi, ke korespondaĵoj ne atingu la oficejojn dum tiu  
periodo. Antaŭdankon.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

## Nova libro

## INVITO AL ĈIELO

Romano originale verkita de

JAMES D. SAYERS

208 p. duontole bindita kun multkolora kovrilo  
Prezo 12ŝ. 6p.

Aperas en Julio. Ĉi tiu verko estas plena de  
aventuroj kaj profetaj ideoj. Ĝi certe estos  
multe preparolata kaj sensacia verko,  
meritanta tradukon en naciajn lingvojn.

*Mendu ĉe*

Universala Esperanto-Asocio  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

# KATALUNA ANTOLOGIO

kompilita de

JAUME GRAU CASAS

Ĉi tiu bele bindita volumo kun 400 paĝoj da poezio, popolkanto kaj mirinda prozo malfermas por la mondo la pordojn al la alta kulturo kaj antikva tradicio de malgranda sed riĉe dotita popolo.

Kiam KATALUNA ANTOLOGIO aperis en 1927 la tuta literaturamanta publiko Esperantista ĝin salutis kiel modelon. Aranĝo, prezento kaj prestekniko staras ekster kritiko. Ĉi tiu unika verko devas nepre trovi lokon sur viaj librobretoj.

Prezo 12 ŝil. 6 pencoj. Afranko 9 p.



*Mendu ĉe*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ALEKSIS KIVI

## SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolkanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., afranko 6p.

*Eldonita de*

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

*Mendu ĉe*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Se interesa romano plaĉas al vi, nepre legu la libron

# MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

El la angla lingvo tradukis

MASON STUTTARD

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, afranko 6p.

“La interesa krim-romano temas pri la perfido de sekretaj kunsidoj de la angla ĉefmilitestraro dum la dua mondmilito. La intrigo estas jena: kiel estas eble, ke la malamiko sciigis pri la sendo de valoraj valvoj per trajno kaj kiel li povis elreligi—feliĉe alian—vagonaron? Multaj homoj estas suspektataj, la kriminalista aparto, la fama Scotland Yard, funkcias grandskale kaj post lacigaj serĉadoj, dramaj kaj streĉaj luktoj oni malkovras ĉion.

La verko mem estas tre streĉa, ni povas ĝin nur rekomendi. Leĝi ĉi tiun libron estas vera ĝuo kaj tre instruplena travivaĵo, ĉar oni ekscias multon ne nur pri la krimesploro sed ankaŭ pri la aranĝoj, metodoj kaj malhelpaĵoj de la fervojista servo.”

*Esperantista Slovaka*

*Eldonita de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.**

*Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando aŭ ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

## PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,

S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.

Esperanto-Esperanta.

Prezo £1 angla, afranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represo de la dua eldono, sed NE reviziita eldono. Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

Mendu ĉe

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.**